



# TEA-BULTENO

8<sup>a</sup> JARO

JULIO - AŬGUSTO 2005

NUMEROJ 7-8

## LINGVA EGALECO, LINGVA SAMRAJTECO!

Jes, tio plej gravas ĉe Eŭropa Unio!!! Tial ... baldaŭan bonvenon al plia oficiala lingvo: ekde januaro 2007 aldoniĝos, al la jam longa listo de 20 oficialaj lingvoj, ankaŭ tiu gaela.

Ekde tiam, ĉiuj dokumentoj estos tradukitaj de kaj al, kio signifas dungon de pli-malpli 30 tradukistoj por plenumi tiun laboron. Tradukistoj kiuj eniras la teamon jam konsistantan el sescent kolegoj. Bagatelaĵo, kiu tute ne koncernas Eŭropan Union, ĉar ĝi jam scias, de kie elsuĉi la bezonatan monon!

Sed ekestas dubo en mia menso: pro kio oni enkondukas alian lingvon, kiam estas jam tute klara la politik-linio de EU, kiu - surpapere - deklaras la oficialecon, la samrajtecon de la lingvoj de ĉiuj ŝtatoj-membroj, sed kiu - praktike - tute malobservas tiun bazan leĝon, per evidentaj diskriminacioj favore al uzado de la angla lingvo. Granda mistero!

Dum vi cerbumados, per kio ankoraŭ EU surprizos nin, mi profitas de via malatento kaj ... forfuĝas ien ajn en nia Esperantio por ĝui semajnon aŭ pli da kunestado kun diverslingvanoj, parolante tiun simplan, neŭtralan, komunan lingvon, kia estas nia Esperanto!

Via Elda

### ATENTU! ATENTU! ATENTU!

**TEA-sidejo estos fermita tuj post la 15<sup>a</sup> de julio ĝis la 31<sup>a</sup> de aŭgusto. Bonan feriadon al vi ĉiuj kaj rebonvenon je la 2<sup>a</sup> de Septembro!**

En septembra programo jam antaŭviditaj estas unuagradaj kaj duagrada kursoj, restarto de ekzercakurso por interpretado (venontjare UK en Florenco!), pli intense oni devos labori por la preparo de la historia libro pri nia TEA (venontjare centjaraĝa!), ne preterlasante tamen la amuzigan flankon de nia programaro, nome projekciado de diapozitivaj kaj filmoj, prezentado de bildoj pri Triesto, trafoliumado de PIV ktp.

Unua ekster-TEA programero estos la grimpadon pinten de Monto Forno, apud Arnoldstein, dimanĉon, la 11<sup>an</sup> de septembro, por la tradicia Festo de Amikeco. Jam nun notu tiun daton sur via mur-kalendaro!

### Julia Programo

01 - vendredo	20.00 - Eminentuloj el nia movada historio: Valdemar LANGLET
05 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
08 - vendredo	20.00 - Kart-ludado
12 - mardo	20.00 - Prepare al la Somera Festo
15 - vendredo	20.00 - Somera Festo en TEA kaj... ... Ĝis la revido je la 2 <sup>a</sup> de septembro!

## TRIESTO KAŜITA

### Malkovru nekongatajn erojn de nia urbo! LA "PULVODUKTO"

En 1690 eksplodis la *Santa Barbara*, nome la pulvejo situanta en la urba Kastelo *San Giusto*. Sekve de tio la deponejo translokiĝis al la fortikaĵo *San Vito* sur la samnoma monteto.

En 1707, kiam la Sendogana Haveno estis malfermita, en Triesto ekzistis ununura Lazareto, lokita en *Campo Marzio*, kiu poste transformiĝis en artilerian arsenalon. Ŝipoj alvenantaj en la havenon kaj kvarantenigitaj, fariĝis tute malŝarĝitaj. Ne nur je la transportitaj varoj, sed krome je ĉiuj ŝipekipaĵoj, inkluzive de pulvo-bareloj por ŝipartilerio.

Facile imageblas, kial tiuj bareloj ne povis resti en la lazareto: do, ili estis aldirektitaj al la "pulvo-magazeno" ene de fortikaĵo *San Vito*.

Por pli facile kaj rapide atingi tiun tenejon, nova vojo estis alcele malfermita: *Salita Promontorio* [supreniro (al) promontoro].

La bareloj kun tiel "delikata" enhavo estis ŝarĝitaj sur transportazenetoj. Tamen tiel facile rimarkebla estis tiu "trafiko", ke dum kelkaj momentoj la irvojo konsidereblis eĉ vera "pulvodukto". Tre pitoreske videblis tiuj paciencaj pulvoportantoj, longavice suprenirantaj la monteton, kaj kruciĝantaj kun aliaj bestoj, valen irantaj.

3ESTULO

## HISTORIAJ PROBLEMOJ

### LA TOMBO DE DIOFANTO

En marto estis publikigita problemo, kies solvon vane mi atendis dum ĉi tiuj monatoj. Nu, bone, du povas esti la kialoj: aŭ la problemo estis tro malfacila aŭ neniu legas TEA-bultenon. Inter la du, mi preferas kredi je la unua hipotezo, tial do mi reprovas prezenti alian historian problemon, iom pli facilan, kaj samtempe publikigas la solvon de la kvizo pri la aĝo de Diofanto. Jen ĝi!

$$x = 1/6x + 1/12x + 1/7x + 5 + 1/2x + 4 = 84$$



Kaj nun ekcerbumu pri ĉi tiu nova kaprompilo! Ĝin al vi prezentas s-ro Bardhyl Selimi.

### OK OR-MONEROJ

Du araboj ekiris por longa piedmarŝado en la dezerto. Unu el ili kunportis kvin panojn, dum la alia tri panojn. Tria persono, ne kunportanta panon, aliĝis al duopo kaj ĉiuj kune daŭrigis enpace kaj amikece la vojaĝon. Kompren-eble, la tutan panon ili dividis honeste en tri egalajn partojn. Je la fino de la vojaĝo, kiel signo de

dankemo, la tria persono donacis al la duopo ok ormonerojn. Post tio li foriris, sed tiam komenciĝis kverelo inter la du araboj. La unua diris:

“Ni dividu la ormonerojn en proporcio de 5 al 3, ĉar, komence de la vojaĝo, mi havis kvin panojn, dum vi kunportis nur tri!”

“Ne, - protestis la dua, - ni dividu en proporcio de 4 al 4, ĉar ni ambaŭ donis panon al la tria”.



Konklude, la du disputantoj petis konsilon al juĝisto, kiu fine dividis la ormonerojn laŭ tute alia kalkulo. Kiel estis la mirinda juĝista solvo?

## L'Esperanto nelle scuole d'obbligo in Italia?

Alla Camera dei Deputati è stata depositata il 10 marzo 2005, d'iniziativa degli on. Barbieri, Ranieli, Mereu, una Proposta di Legge relativa a:

“Disposizioni in materia di accesso allo studio e all'uso della lingua internazionale esperanto”.

La relazione introduttiva, pur nell'enfasi retorica del politichese d'obbligo, offre un quadro sufficientemente completo della situazione attuale in Europa, con esplicito riferimento al sistema del multilinguismo adottato nelle istituzioni comunitarie, definito “costosissimo e paralizzante”. Da qui l'adozione a Bruxelles, per ragioni pratiche, delle “lingue di lavoro”, azione che attua di fatto la discriminazione linguistica, favorendo alcune lingue con un “effetto distruttivo sulle altre lingue europee ridotte al ruolo di dialetti”. Ponendo nel dovuto risalto la doverosa difesa della lingua italiana, si caldeggia quindi “l'equiparazione alle attuali lingue di lavoro di una vera lingua transnazionale, non etnica, economica e moderna, alla portata di tutti, che svolga una funzione riequilibratrice sulle lingue cosiddette «forti», restituendo alle lingue oggi diventate di serie B o C la pari dignità cui hanno pieno diritto”.

Un'esauriente esposizione delle caratteristiche essenziali dell'esperanto prelude all'esplicita richiesta dell'insegnamento facoltativo fin dalla scuola dell'obbligo, richiamandosi anche alla relazione della Commissione Matulli del 1993, e delegando al Ministro dell'istruzione, dell'università e della ricerca la definizione delle modalità di attuazione.

Ed ecco l'articolato della

### PROPOSTA DI LEGGE

#### ART. 1.

1. Tra gli insegnamenti elettivi di lingua straniera nella scuola statale dell'obbligo, è introdotto l'insegnamento della lingua internazionale esperanto.

2. L'insegnamento di cui al comma 1 è istituito secondo un programma e orari stabiliti con decreto del Ministro dell'istruzione, dell'università e della ricerca, di seguito denominato «Ministro», con le modalità previste dalla legislazione vigente per le lingue straniere.

3. Con decreto del Ministro sono altresì stabilite le

modalità per la costituzione di cattedre e di incarichi di insegnamento della lingua internazionale esperanto.

#### ART. 2.

1. Fatto salvo quanto previsto dall'articolo 1, comma 1, il Ministro può istituire, con proprio decreto, l'insegnamento della lingua e della letteratura esperanto, in conformità alle disposizioni vigenti per gli insegnamenti e i programmi di lingue e di letterature straniere, nelle scuole e negli istituti il cui piano di studi comprende l'insegnamento di almeno due lingue straniere.

2. Il Ministro provvede a fornire adeguata informazione e sensibilizzazione sulle motivazioni della scelta della lingua internazionale esperanto.

#### ART. 3.

1. Con decreto del Ministro, ai sensi dell'articolo 40 del testo unico di cui al decreto legislativo 16 aprile 1994, n. 297, sono stabiliti i titoli validi per l'ammissione ai corsi di abilitazione di lingua e letteratura esperanto e le relative classi di concorso.

2. Fino a quando non siano istituiti i corsi universitari di lingua e letteratura esperanto, possono essere ammessi ai corsi di abilitazione candidati in possesso del diploma di laurea e del diploma di magistero, rilasciato dall'Istituto italiano di esperanto, oppure in possesso di diplomi universitari stranieri riconosciuti equipollenti alla laurea italiana in lingua e letteratura esperanto.



È indubbiamente un passo avanti, anche se è necessario frenare prematuri entusiasmi. Manca difatti meno di un anno alla fine di questa legislatura e nemmeno è da trascurare la penuria di possibili insegnanti, che non dobbiamo esitare a definire “tragica”. Comunque il problema linguistico e soprattutto la discriminazione di fatto stanno venendo prepotentemente alla ribalta.

È del 16 giugno un articolo su “Le Figaro” di Parigi che commenta un recente rapporto del Servizio della Ricerca in Educazione (SRED) di Ginevra intitolato “L'insegnamento delle lingue viventi straniere come politica pubblica”, che mette in evidenza come “il Regno Unito guadagna, a titolo di netto, al minimo 10 miliardi di euro per anno a causa della dominanza attuale dell'inglese” che arriva ad un “totale che va dai 17 ai 18 miliardi di euro per anno”, se si calcolano tutti gli interessi indotti, senza tener conto del vantaggio di cui godono i madrelingua inglese “in ogni situazione di negoziato o di conflitto che si svolge nella loro lingua”. Forse questi argomenti “venali” – non si deve dimenticare che sono gli interessi a muovere il mondo – possono essere più efficaci di mille e mille ragioni ideali.

L'articolo, dal punto di vista francese, appoggia il multilinguismo, proposta notoriamente insostenibile, ma dobbiamo tener presente che il problema linguistico potrà esplodere molto presto e il movimento esperantista deve prepararsi per affrontarlo. Subito.

VIGLO

## Kie libertempadi en Esperantujo?

Internacia Esperanto-Konferenco—IEK 2005

marborde, en Rafina, Grekio

9-15 julio 2005

Temo: La bizanca kulturo

Informoj, aliĝoj ĉe

Mantha Christou  
Pericleous 19  
GR-15451 Athina/N Psychiko  
mantha@otenet.gr

Erich Laubacher  
1 rue de Bougainville  
FR-78180 Montigny-Bx  
kasisto@osiek.org

## Alcalà de Henares

De la 7<sup>a</sup> ĝis la 10<sup>a</sup> de julio

La programo estas tre riĉa je eminentaj prelegantoj, kiuj pritraktos temojn ligitajn al la figuro de Don Kihoto.

Amelia FERNÁNDEZ: La imagita Kihoto.

Jorge CAMACHO: Influo de Fernando de Diego en la originala Esperanta beletro.

Antonio VALÉN: La tradukoj de Fernando de Diego.

Jorge CAMACHO: Gigantoj kaj muelejoj de Esperantujo: *Ankaŭ en la eta sed densa Esperantujo ekzistas muelejoj kaj gigantoj, ne nur en la figura senco cervantesa sed ankaŭ en tiu strikta: gigantoj (tamen ne monstroj) de niaj historio kaj beletro, kaj lokoj kie oni muelas la tritikon ĉiutagan...*

David GALADÍ: Sancho Panza legas la horon en la ĉielo: pri-astronomiaj komentoj al la 20<sup>a</sup> ĉapitro de la unua parto de *Don Quijote*.

Ĉio ĉi estas nur eta parto de ia tuto vere alloga. Sed ne nur seriozaĵoj: kompreneble oni vigle prizorgos pri turismo, amuzajoj ktp ktp en la sunoplana, varma kaj gastema hispana urbo Alcalà de Henares, apud Madrido.

Pliajn informojn petu de Hispana Esperanto-Federacio:

[www.esperanto-es.net](http://www.esperanto-es.net)



KULTURA ESPERANTO FESTIVALO  
EN HELSINKO

Ĉu jam vi aŭdis, ke okazos en Helsinko, Finnlando, KULTURA-ESPERANTO FESTIVALO de la 16<sup>a</sup> ĝis la 23<sup>a</sup> de julio? La festivalo koncentriĝas sur originale esperanta kulturo kaj estas konata pro

tre altkvalita programo: roko, popo, opero, trobadoroj, poemoj, filmoj, romanoj, noveloj, teatraĵoj, karaokeo, diskoteko. Ĝi celas ĉiuagajn, kulturemajn partoprenantojn. Dum KEF eblos ne nur vidi prezentojn literaturajn, muzikajn kaj teatrajn, sed partopreni mem: ekz. verki poemojn en poematieroj, konatiĝi kun prozostiloj, kun filmodublado, kun popmuziko, esperantaj ampoemoj aŭ krimromanoj ... kaj multo pli. Kaj evidente, vi ne povas eviti konatiĝon kun nia finna kulturo: Kalevala, *kanteleo* (praa kordoinstrumento), ŝamanoj kaj naturo.

Informoj aperas ĉe [www.esperanto.fi/kef2005](http://www.esperanto.fi/kef2005).

## 73<sup>a</sup> Itala Kongreso de Esperanto

Rimini - 2 - 7 septembro 2005

LA KOMUNIKADO ESTAS FONTO DE PROGRESO.

Rimini kaj ĝia marbordo estas vaste konataj, Italio kaj eksterlande, pro la someraj libertempoj, gastamo kaj amuzajoj. Sed ĝi estas konata ankaŭ en esperantista medio, pro la multaj tie okazintaj Esperanto-kongresoj:

- 1965, 36<sup>a</sup> Itala E-Kongreso;
- 1970, 22<sup>a</sup> Internacia Kongreso de Fervojistoj;
- 1976, Nacia Kunveno de Esperantistoj Katolikaj (UECI);
- 1997, 49<sup>a</sup> Kongreso de Esperantistoj Katolikaj;
- 2003, 16<sup>a</sup> Internacia Ekumena Kongreso (IKUE).

Al la internacia lingvo kaj ties kreinto, oni dediĉis du urbajn stratojn: "Via Esperanto" kaj "Via L.L. Zamenhof".

Kelkaj dokumentoj atestas, ke jam en la jaro 1908 agadis du esperantistaj pioniroj, Pastro Alberto Migani kaj la fratoj Barillari (pastaj-produktantoj).

La unua Rimina Esperanto-Grupo estis fondita en 1913 kaj oficialigita en 1915, per la nomo "Grupo Rimina Espero".

Dum jaroj vigle agadis en la grupo la franciskana pastro Modesto Carolfi, kiu dediĉis sin al instruado, interalie verkis ankaŭ gramatikon kaj tradukis religiajn librojn kaj la turisma gvidlibreto pri Rimini. Li estis ankaŭ la fondinto de Esperantista Unuiĝo de Italaj Katolikoj (1920).

Lia disciplo estis Pastro Albino Ciccanti, kiu studis kaj disvastigis Esperanton ekde la jaro 1960 ĝis sia forpaso en 1994.

La programo de la ĉijara itala kongreso estas tre bunta kaj varia, la hoteloj estas elegantaj kaj moderprezaj, la kongresejo situas ĉe la bela Adriatika marbordo kaj... nu, ĉiuj ĉi allogaj premisoj certe jam konvinkis vin, ke indas la partopreno. Do, rapide sendu viajn aliĝon kaj hotelan mendon al la organiza Komitato, por ne riski perdi ĉi belan okazaĵon!

Organiza Komitato 73<sup>o</sup> Congresso Italiano di Esperanto, Viale Zavagli, 73 - 47900 Rimini - [Iturci@libero.it](mailto:Iturci@libero.it) - tel. 054126447

Informojn kaj aliĝilojn

eblas ricevi ankaŭ de TEA-sekretario.

**Formosa folio** Nova Esperanta bulteno el Tajvano. Temas pri nova revuo por tajvanaj esperantistoj enhavanta kulturajn, movadajn, poeziajn artikolojn. Ĝi konsistas el 20 paĝoj, aperas ĉiusezone kaj unu numero kosta 2 eŭrojn, pageblajn al UEA-konto de la redaktoro: gkay-f. Pliajn informojn ĉe la redaktoro mem, s-ro Grego Kay: [formasafolio@yahoo.com](mailto:formasafolio@yahoo.com)

**Itala reta cirkulero** sendata al pli ol 2.000 legantoj! NOVA SENTO IN RETE estas servo de Itala Esperanto-Federacio kaj de Itala Esperantista Junularo. La celo duoblas: a) kunordigi italajn geesperantistojn pere de ofta bulteno; b) doni selektitajn informojn al tiuj kiuj alproksimiĝas al la movado. NSiR, atinginta sian 430-an eldonon, naskiĝis septembre 1997. Ĉiuj rajtas peti eldonon de anoncoj kaj artikoloj, kondiĉe ke tiuj temu pri esperanto. La kontribuoj povas esti en esperanto aŭ itala. Por kromaj informoj, ankaŭ interŝanĝ-celaj: [nova-sento@esperanto.it](mailto:nova-sento@esperanto.it) [www.esperanto.it/html/nsir.htm](http://www.esperanto.it/html/nsir.htm)

# Mallonge pri...

**Thorsen-apogo por Bibliotekoj** Esperanto-bibliotekoj povas denove peti librojn, kiuj mankas en iliaj kolektoj, ĉar jam la naŭan fojon UEA disdonos subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Por subvencio rajtas kandidatigi bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. La petojn devas akompani listo de dezirataj libroj, ordigita laŭ prefero. Diskoj, sonkasedoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estas subvencieblaj. La subvencio oni ricevos kiel librojn surbaze de la listo, kiu akompanis la peton. La petoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA plej laste la 15<sup>an</sup> de oktobro 2005. Krom paperpoŝte (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando), eblas sendi ilin ankaŭ rete al [direktoro@co.uea.org](mailto:direktoro@co.uea.org).

**La 90<sup>a</sup> UK jam super 2000 aliĝintoj!** Ĝis la 1<sup>a</sup> de junio

entute 2040 kongresanoj el 60 landoj aliĝis al la Kongreso en Vilno. Sekve jam du monatojn antaŭ sia komenco la Vilna UK superis la pasintjaran UK en Pekino, al kiu aliĝis 2031 kongresanoj el 51 landoj kaj kiu estis la plej granda UK post la UK en Berlino, 1999, kiu arigis 2712 aliĝintojn. Kun 357 aliĝintoj la gastigonta lando Litovio estas ĉe la pinto de la statistiko. Sekvas Francio (225), Japanio (165), Germanio (154), Pollando (95), Rusio (91), Italio (78), Nederlando (73), Finnlando (68), Svedio (62), Belgio (59), Ĉeĥio (45), Britio (44), Danio (40) kaj Usono (38).

*Raportis: Osmo Buller*

**Esperanto kiel laborlingvo en la Kuba Informagentejo AIN** Krom la hispana, portugala, angla kaj franca lingvoj, ekde nun ankaŭ Esperanto estas laborlingvo en la Kuba Informagentejo AIN, kies retadreso estas <http://www.ain.cu>. La Esperanta paĝaro troviĝas ĉe: <http://www.ain.cubaweb.cu/idioma/esperanto/principalesperanto.htm>. Estas bonvenaj mesaĝoj al [ainnews@ain.cu](mailto:ainnews@ain.cu).

*Informis Norberto Diaz Guevara - Sancti Spiritus, Kubo*

**Esperanto en hispana universitato** Jam sepajare, la Universitato de La Laguna ofertas la liberelektan seminarion por la universitata studentaro kadre de la Fakultato pri Filologio (Lingvistiko) "Enkonduko al Esperanto kaj ties kulturo": temas pri tridek-hora instruado ne nur de la lingvo, sed ankaŭ de la historio kaj kulturo de Esperanto kaj aliaj



planitaj lingvoj (interlingvistiko). La iniciatinto de la kurso estas Alejandro Lopez de Vergara Méndez, profesoro pri Filologio en la Universitato. Ĝi komenciĝis komence de marto kaj je la fino oni donos kaj atestilon, post sukcesa, libervola ekzameno aŭ mallonga tezo, kaj tri akademian kreditojn. Dum la kurso la diversaj temoj rilate al la esperanta kulturo estis pritraktitaj de kompetentaj prelegantoj. Profesoro Alejandro López de Vergara reprenis la laboron de Juan Régulo Pérez en la Universitato de La Laguna kaj ekde 1999 jam pli ol 150 gelernantoj sekvis la kurson (ĉiujare pli ol 30). Por pliaj informoj: <http://webpages.ull.es/users/aflopez/esperanto/index.htm>







**Serĉata instruisto de Esperanto** Kiu kuraĝulo havas la eblecon kaj pretas proprakoste veturi al Bangaloro, Suda Barato/Hindujo, por instrui Esperanton al lernantoj en lokaj lernejoj? Kono de la angla, eĉ se elementa, estos avantaĝo. Vi devas pagi viajn vojaĝkostojn, sed estos surloke gastigataj. Vi rajtas resti tiom longe kiom vi volas/povas, sed almenaŭ du-tri monatojn. Se vi estas tiu kuraĝulo, bonvolu skribi samtempe al [evoluo@esperanto.org](mailto:evoluo@esperanto.org) kaj al Venkatesh Reddy, [esperovr@yahoo.co.in](mailto:esperovr@yahoo.co.in), por interkonsenti pri la afero. Adreso: A.S Venkatesh Reddy, No 216, Espero, Off Main Road, Whitefield, Bangalore-66, Karantaka, Barato/Hindujo



## BAMI GORENG

Azia specialaĵo el frititaj nudeloj kaj porkaĵo, kiel klare montras la nomo: fakte *Ba* signifas "porkaĵo" kaj *Mi* "nudeloj". Tiu ĉina manĝaĵo, importita en Indonezion de la multaj tie loĝantaj ĉinoj, estas nuntempe preparata per kokida viando, anstataŭ per porka.

### INGREDIENCOJ (4 SAMTABLANOJ)

400g	da kokida brusta fileo	
250g	da ovonudeloj	
300g	da brasiko	
150g	da kuiritaj pizoj	
150g	da poreo	
2	cepoj	
2	ajlobulberoj	
75g	da sojaj ŝosoj	
6 supkuleroj	da soja saŭco	
5 supkuleroj	da oleo	
	salo	

### PREPARADO

Lavu viandon kaj brasikon sub flua akvo, ĉion sekigu per suĉpapero kaj tranĉu viandon kaj brasikon en mallarĝajn striojn.

Kuiru la nudelojn en salita bolanta akvo, sed nur tiom, ke ili ankoraŭ restu sufiĉe malmolaj ĉe la mordoprovo. Senakvigu la nudelojn. Purigu la poreon, senŝeligu la cepon kaj tranĉu la legomojn en pecetojn. Senŝeligu kaj elpremu la ajlobulberojn. Varmegigu la oleon en kaserolo kaj rostumu la viandon dum kelkaj minutoj sur granda flamo. Aldonu la cepojn kaj ajlon kaj kunrostumu ilin 2 minutojn. Poste enkaseroligu la ĉinan brasikon kaj poreon kaj kunrostumu ilin dum unu minuto, post tio la pizojn, rostante ilin dum 1 minuto. Fine aldonu la sojajn ŝosojn kaj nudelojn kaj ĉion kunrostumu dum unu minuto. Spicu per soja saŭco kaj, kaze de bezono, per salo kaj muelita nigra pipro.

**Iuj Inform-artikoloj fontas el RET-INFO, NUN kaj NOVA SENTO.**

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO  
Sidejo: Via del Coroneo 15 - 34133 Trieste  
tel/fakso: +39 040 763128

Reto: [esperantotrieste@adriacom.it](mailto:esperantotrieste@adriacom.it); [nored@tele2.it](mailto:nored@tele2.it)  
<http://arte.triesteincontra.it/esperanto>

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio  
Poŝtĉekkonto N° 10834349